

JOSEPH CONRAD, POLO KIU IĜIS GRANDA ANGLA VERKISTO

de Marjorie BOULTON

Prelego farita en I.S.U., Varsovio, 1959

La granda verkisto, kiu por angloj estas Joseph C o n r a d, prezentas unikan fenomenon en la literatura historio. Pri li, hodiaŭ, mi intencas iom paroli; ĉar taŭgas kaj decas ke, en la lando de Z a m e n h o f, en la vera naskiĝlando de tiu granda verkisto C o n r a d, mi nun, kiel amanto de la angla literaturo, danku al Pollando pro la donaco de sia granda filo.

Tiu granda angla romanisto kaj novelisto naskiĝis en Berdyczew, je la 3-a de decembro, 1857, preskaŭ precize du jarojn antaŭ Zamenhof. Liowski. Liaj junaj jaroj estis suferoplenaj; en 1862 lia patro estis arestita estis polo, kies plena nomo estis Josef Teodor Konrad Nałęcz Korzeni-kaj deportita en Rusujon pro polaj naciismaj aktivoj kontraŭleĝaj, kaj restis en ekzilo ĝis 1867. La unuan parton de la ekzila periodo li pasigis en Vologda, en norda Rusujo. La heroe lojala edzino, kiel tre multaj polaj edzinoj de tiu tragika epoko, propravole akompanis la edzon al regiono de malvarma klimato, kaj al turmenta malriĉeco. En aprilo 1865, ŝi mortis pro tuberkulozo. La infano, kiun ŝi devis preni kun si en ekzilon, iĝis malforta; kaj, same kiel miloj da solecaj kaj malfeliĉaj infanoj, li multe legadis. En 1869, kiam Jozef estis ankoraŭ nur dekunu-jara, ankaŭ la patro mortis, en Krakovo. Avino, aliaj parencoj kaj privata instruisto zorgis pri la orfo. Jozef do - same kiel Zamenhof - tre frue en la vivo konatiĝis kun tragedio, kun la krueleco de la homoj, kaj ekkomprenis ankaŭ tiujn konceptojn de grandanimeco, sinoferado kaj fideleco, kiuj troviĝas preskaŭ ĉie en lia verkaro.

Kiam Jozef estis nur 15-jara, li jam esprimis, ne kiel nuran kapricon, la deziron iĝi maristo, kvankam la onklo, kiu multe respondecis pri li, ne aprobis. En 1875 li faris vojaĝon en franca ŝipo, kiel maristo, poste faris aliajn, kaj en 1878 faris sian unuan vojaĝon en brita ŝipo. Post tiu ŝlosila dato, 1878, li laboris kiel maristo ĉiam en britaj ŝipoj; kaj li komencis studi por la britaj profesiaj maristaj ekzamenoj. Spite la gravajn lingvajn malfacilaĵojn, li bonege progresis en tiu kariero, sukcesante en diversgradaj ekzamenoj. En 1886 li iĝis brita civitano — tiam li estis 29-jara - kaj baldaŭ poste iĝis kapitano de brita ŝipo. Lia unua vojaĝo estis tre malfacila, sed li sukcesis. Kaj iom poste li komencis verki sian unuan romanon, en la angla lingvo: *Almayer's Folly* („Frenezaĵo de Almayer”).

En Afriko, dum li vojaĝis en la Konga regiono, lia sano grave difektiĝis; post 1891 li neniam plu ĝuis vere bonan sanon; li estis turmentata

per malaria podagro. En 1894 lia tre sukcesa kaj meritplena marista kariero devis finiĝi. Li estis nur 36-jara kaj en plena mensa vigleco.

Lia unua romano estis eldonita de la unua eldonisto, al kiu li proponis ĝin. Tia bonŝanco estas io tre neordinara en verkista kariero. En 1896 li edziĝis - al angla virino, kiu poste estis bonega edzino kaj montris inteligentan intereson pri lia verkado; ili havis du filojn. Kaj, uzante la nomon Joseph C o n r a d, li iĝis verkisto tre eminenta inter anglaj verkistoj, kaj lia reputacio neniam poste malaltiĝis. Preskaŭ konstante malsana kaj en doloro, „C o n r a d”, inter 1896 kaj sia morto en 1924, verkis 26 librojn, plejparte romanojn kun kelkaj novelaroj kaj dramoj, kaj multe uzis la interesajn travivaĵojn de sia marista vivo.

La tuta historio estas iom neordinara; sed eble la plej neordinara parto de ĝi estas la kvazaŭ mirakleca fakto, ke polo ne nur perfekte majstris la anglan lingvon, sed uzis ĝin por la plej altnivela literatura kreado, ĝis en Anglujo mem li iĝis eminenta aŭtoro kaj jam klasika aŭtoro. Li ĉiam memoris la amatan polan lingvon de la martiraj gepatroj, kaj ĉiam gardis la kapablon paroli ĝin perfekte. Dum la pli granda parto de la vivo li tute ne havis okazon uzi la polan, sed, plurfoje, oni aŭdis lin paroli ĝin dum li deliris. Li tre bone scipovis la francan lingvon, kaj skribis multajn leterojn per ĝi; la konata angla verkisto Ford Madox F o r d asertis, ke C o n r a d parolis la anglan kun tiel forta franca akcento, ke je la komenco oni apenaŭ komprenis lin. Li ankaŭ modere bone scipovis la germanan kaj latinan.

Sed lia skriba uzo de la angla lingvo estis perfekta. Oni taksas lin en Britujo kiel unu el la plej grandaj majstroj de angla proza stilo. Lia angla vortprovizo estas tiel granda, ke junaj aŭ nekleraj anglaj legantoj ofte devas uzi la vortaron, kaj por anglaj filistoj li estas „tro malfacila”! Estis ja nature, ke homo kiu bone sukcesis en la anglaj maristaj ekzamenoj, bone sciis la anglajn maristajn terminojn; kaj tiujn terminojn li multe uzas en la verkoj; sed lia ĝenerala vortprovizo ankaŭ estis grandega kaj perfekte nuancita. La ekstrema riĉeco de lia sinonimaro prezentas ofte malfacilan taskon al iu, kiu volas traduki liajn verkojn en Esperanton.

Liaj anglaj frazritmoj montras absolutan, trankvilan memfidon pri la lingvo. Kompreneble oni ne povas, en traduko, doni perfektan ekvivalenton, sed mi citos paragrafon, kiu eĉ en traduko iom montras kiel C o n r a d uzas longajn kaj mallongajn frazojn por iom modifi la etoson: li priskribas ŝipkapitanon dum tifono:

„Kaj la plej malbona estis ankoraŭ venonta! Li estis kontenta, ĉar oni sufiĉe frue trovis la konflikton en la interferdekejo. Se la ŝipo spite ĉiun devos alfundiĝi, almenaŭ ĝi ne alfundiĝos plena de homoj kiuj batalas per dentoj kaj ungoj. Tio estus naŭza. Kaj en lia sento estis ia humana intenco kaj nebula deco-sento.

Tiuj tujaj pensoj estis tamen esence pezaj kaj malrapidaj, kiel taŭgis al la temperamento de la viro. Li etendis sian manon por remeti la

alumetskatolon en la ĝustan angulon sur la breto. Alumetoj ĉiam troviĝis tie, laŭ lia ordono. La ŝipservanto ricevis tiajn instrukciojn antaŭ longa tempo. „Skatolon ... ĝuste tie, komprenu! Ne tro plenan ... kie mi povos tuj meti la manon sur ĝin ... Povos bezoni lumon urĝe. Surŝipe oni neniam scias, kion oni eble bezonos urĝe ... Nu, zorge.”

Kaj kompreneble li, siaparte, zorge kaj skrupule remetadis la skatolon en ĝian lokon. Tiel li nun faris, sed antaŭ ol li forprenis la manon, eniris lian kapon la penso, ke eble li neniam plu havos okazon uzi tiun skatolon. La viveco de la penso haltigis lin, kaj dum infinite malgranda sekundero liaj fingroj refermis sin sur la malgrandan objekton kvazaŭ ĝi estus la simbolo de ĉiuj tiuj ĉi etaj kutimoj, kiuj katenas nin al la laciga vivorondo. Finfine li demetis ĝin, kaj, lasante sin fali sur la sofon, aŭskultis por aŭdi la unuajn sonojn de la revenonta vento.

Ankoraŭ ne. Li aŭdis nur la bruadon de akvo, la fortajn plaŭdojn, la obtuzajn skusonojn de la miksitaj ondoj kiuj el ĉiuj partoj atakis lian ŝipon. Ĝi neniam havos okazon malplenigi la ferdekojn.”

La bonhumoro de *Conrad* kaj lia ironio estas tute laŭ la angla stilo kaj sento. El la sama romano, *Typhoon* („Tifono”) mi legos parteton pri la kapitano, kiu estas homo meritplena kaj devosenta, sed al kiu mankas fantazio, multaj ordinaraj emocioj, kaj ĉiu instinkto pri troa aŭ retorika parolado. La ŝipo, la *Nan-Shan*, portas ne britan, sed siaman flagon, kaj por Jukes, subulo de la kapitano, tiu ekzotika flago obtuze ofendas lian malfortan ŝovinisman. Sed la miskomprenemo de la kapitano igas lin tre komika:

„Post la novaĵoj pri la projektita flag-transigo Jukes iĝis maltrankvila, kvazaŭ sentante ian personan ofendon. Li iradis tien kaj reen gruntante kaj eligante mallongajn, malestimajn ridojn. „Pensu pri ridinda elefanto, kvazaŭ el arko de Noao, en la flago de nia ŝipo!” li iam diris, ĉe la pordo de la maŝinejo. „Al la infero, se mi povas toleri ĝin; mi ekŝiĝos el mia posteno. Ĉu ĝi ne naŭzas vin, sinjoro Rout?” La maŝinestro nur purigis la gorgon, kun la mieno de homo, kiu komprenas la valoron de bona posteno.

La unuan matenon kiam la nova flago flirtis ĉe la malantaŭo de la *Nan-Shan* Jukes amare rigardadis ĝin de la ponto. Li luktis kontraŭ siaj emocioj dum tempo, poste diris: „Stranga flago sub kiu ni velas, sinjoro kapitano.”

„Kio estas malbona pri la flago?” demandis Kapitano MacWhirr. „Ŝajnas tute en ordo al mi.” Kaj li marŝis al la fino de la ponto, por pli bone rigardi.

„Nu, ĝi aspektas stranga al mi.” eksplodis Jukes, tre agacite, kaj foriris de la ponto.

Lia malĝentileco konsternis la kapitanon. Post tempeto, li paŝis kviete en la mapoĉambron, kaj malfermis sian Internacian Signal-Ĉifrolibron ĉe la bildo, kie la flagoj de ĉiuj nacioj, korekte desegnitaj, sidas en buntaj vicoj. Li trakurigis la fingron, kaj, kiam li venis al

Siamo, li tre atente observis la ruĝan kampon kaj la blankan elefanton. Nenio povus esti pli simpla; sed por absolute certiĝi li portis la libron al la ponto, por kompari la kolorbildon kun la ŝipa flago. Kiam, la duan fojon, Jukes, kiu tiun tagon deĵoris kun ia subpremita sovaĝeco, iris sur la ponton, la kapitano diris:

„Estas nenio malbona pri tiu flago.”

„Ĉu ne?” grumblis Jukes, genuante antaŭ ferdekan keston, kaj malbonhumore tirante el ĝi ekstran sondŝnuron.

„Ne. Mi kontrolis en la libro. Longeco duoble la larĝeco, elefanto precize en la mezo. Mi kredis, ke la homoj ĉe la marbordo scias, kiel fari la lokan flagon. Nature. Vi malpravus, Jukes.”

Kompreneble la senretorika, iasence naiva sed alisence tre racia sinteno de la kapitano preskaŭ sensaĝigas la kompatindan Jukes.

Se tempo permesus, mi povus citi multajn aliajn ekzemplojn de kvieta, milde ironia bonhumoro, kiu perfekte spegulas la anglan etoson. Sed tempo ne permesas.

La angloj estas konataj kiel maristoj; sed *Conrad*, la polo, plej bone montris al la mondo en romanoj la famajn anglajn ŝipojn, kaj la emociojn de maristoj. Eble lia reputacio estas en Anglujo tre alta, parte ĉar li esprimis por ni multajn emociojn, kiujn multaj angloj sentis, sed ne kapablis esprimi por si mem. Sur la unua paĝo de lia tre bona romano *Chance* („Hazardo”) ni trovas frazon, kiu esprimas grandan parton de liaj ideoj pri la maro kaj marista vivo:

„Se ni, maristoj, farus nian laboron, tiel kiel homoj sur la tero, alt-rangaj kaj malaltrangaj, faras la sian, ni neniam gajnus nian vivrimedon. Neniu dungus nin. Kaj ankaŭ, neniŭ ŝipo, navigita aŭ veturigita laŭ la senzorga maniero de ne-maraj laboroj iam ajn alvenus al la haveno.” La maro postulas sinceran laboron kaj aŭtentikan kompetentecon. La maro provas la homojn. Tipo ofte trovita en la romanoj de *Conrad* estas mar-kapitano, kies aliaj ecoj povas varii, sed kiu ĉiam havas fortegan respondeco-senton kaj serenon obeon al la devo.

La maro estas, en tiuj romanoj, personeco. Kaj ni demandu al ni, dum momento, kiom da verkistoj sukcesis doni plenan vivon al io ekster la konata homa. La tasko estas tre malfacila. Sed *Conrad* sukcesas kaj resukcesas pri la amata kaj timata maro en multaj diversaj romanoj:

„Tenu forte!”

Ili tenis forte. Eksplodo de malkatenita furiozo, malica ventatako, absolute ekvilibrigis la ŝipon; ĝi nur balanciĝis, rapide kaj malpeze kiel la lulilo de infano, dum terura momento de nervostreĉo, dum la tuta atmosfero, verŝajne, fluegis kolere preteren, formuĝis de la mallumega terglobo.

Ĝi ŝufokis ilin, kaj, kun okuloj fermitaj, ili pli forte tenis. Io, kio laŭ la forto de la skuo povis esti akvokolono kiu kuras, vertikala, en la mallumo, batis sin kontraŭ la ŝipon, rompiĝe mallongiĝis, kaj falis sur la ponton, premege, el alte, kun mortiga, enteriga pezo.

Fluganta fragmento de tiu kolapso, nura plaŭdakvo, volvis ilin en unu kirliĝo, de la piedoj ĝis super la kapoj, plenigante perforte la orelojn, buŝojn kaj nazotruojn per sala akvo. Ĝi forbatis la krurojn, tiris furioze al la brakoj, forbolis rapide sub la mentonoj; kaj, malfermante la okulojn, ili vidis la ŝaŭmamasojn kiuj rapidis tien kaj reen inter, laŭaspekte, fragmentoj de ŝipo. Ĝi kolapsis, kvazaŭ tuj fendita. Ankaŭ iliaj senspiraj koroj cedis, pro tiu monstra bato; kaj tuj subite ĝi denove ĵetis sin al la senespera plonĝado, kvazaŭ ĝi penis eltreni sin de sub la ruinaĵoj.”

Tifono.

„La amo, kiun homoj donas al la maro, profunde diferencas de la amo, kiun ili sentas pri ĉiu kreitaĵo de siaj manoj - ekzemple, la amo, kiun ili sentas pri siaj domoj - ĉar ĝi tute ne estas makulita per posedfiero. Eble ĝi enhavas la fieron de lerteco, la fieron de respondeco, la fieron de tolerkapablo, sed cetere ĝi estas nepersona sento. Maristo neniam amis ŝipon, eĉ se ĝi apartenis al li, nur pro la profito, kiun ĝi metis en lian poŝon. Neniu, kredeble; ĉar ŝip-posedanto, eĉ la plej bona, ĉiam estis ekster tiu sento, kiu entenas en egala kamaradeco la ŝipon kaj la homon, kiuj subtenas unu la alian kontraŭ la senkompata, kvankam kelkfoje vualita, malamikeco de la akvomondo. La maro - tion ĉi oni devas konfesi - ne estas grandanima. Neniu ajn pruvo de virecaj kvalitoj - kuraĝo, harditeco, toleremo, fideleco - iam ajn tuŝis ĝian senrespondecan potenco-konscion. La oceano havas la senkonsciencan humoron de sovaĝa aŭtokrato, morale detruita per troa adorado. Ĝi ne toleras eĉ la aspekton de defiemo, kaj ĝi restis la nepacigebla malamiko de ŝipoj kaj homoj, ek de la tago kiam ŝipoj kaj homoj montris la neimageblan aŭdacon iri kune sur la akvo, defiante la malridon de la maro. Ek de tiu tago, la maro daŭre englutis multajn ŝipojn kaj homojn, sen sagiti sian venĝemon per tiom da detruitaj ŝipoj kaj vivoj. Hodiaŭ, kiel ĉiam, ĝi estas konstante preta trompi kaj perfidi, frakasi kaj dronigi la nekorekteblan optimismon de la homoj kiuj, subtenitaj per la fideleco de ŝipoj, penas perforte preni de ĝi la enspezon de la hejmo, la estrecon de sia mondo, aŭ nur manĝoprovizon kontraŭ malsato. Se ne ĉiam en la brula humoro, por frakasi, ĝi restas ĉiam kviete preta por dronigi. La plej miriga strangaĵo de la marprofundo estas ĝia nesondebla krueleco.”

The Mirror of the Sea - La Spegulo de la Maro.

La romanoj kaj noveloj de C o n r a d estas ĉiam streĉe interesaj, kaj oni povas legi ilin, kiel mi legis kiam mi estis dekkvinjara, nur pro la bona historio, por vidi, kio okazos. Sed lia psikologio estas interesa miksaĵo de simpleco - tamen esence vera simpleco - en la bazaj konceptoj, kaj de tre delikata kaj perceptema detalado en la individuoj.

Preskaŭ tute centra en la psikologio de C o n r a d estas lia estimo

- la estimo de iama markapitano - al tiu *fidelity*, kiun ni povus en diversaj kontekstoj nomi *fideleco*, *lojaleco* aŭ *respondeco*. Homo, kiu havas tiun econ, povas esti groteska, povas esti komika, povas havi grandajn malfortecojn, eĉ malvirtojn, sed li estas al C o n r a d simpatia. Tre bona romano lia estas *Lord Jim*, „Lordo Joĉjo” - en kiu maristo, per unu ago de mallojaleco kiam la kuraĝo mankis en krizo, kvazaŭ detruas sin. Lia tuta posta vivo estas penado, restarigi sian memestimon per vivo elstare „fidela”. Je la fino Jim estas detruita de homo, kiu ne havas la koncepton pri fideleco aŭ honoro, kaj kiu trompis lin. Sed je tiu tragika fino, ni sentas ke Jim venkis, ke la aliaj malvenkis; en la lasta momento Jim estas viro plene restarigita kiel fidelulo.

Kelkloke la konceptoj de C o n r a d pri etiko ŝajnas iom eksmodaj. Hodiaŭ ni ne emas tiel multe paroli pri „honor”; la vorto havas iom renesancan guston; kaj la kavaliereco de C o n r a d, ekzemple, apartenas al pasinta epoko. Sed, esence, lia distingo neniam estos eksmoda; en ĉiu societo, tre gravos la diferenco inter la aŭtentikaj homoj, la fideleco-homoj, kiuj faras sian devon, plenumas siajn promesojn, ne mensogadas, akceptas noble la respondecojn, kiujn la vivo trudas al ili; kaj la homoj ne fidelaj, al kiuj mankas devosento, kiuj konas nur egoismon. La sopiro al senmakula persona honoro ja ankoraŭ ekzistas, kvankam ni nun uzas iom malsimilajn vortojn por priparoli la honoron, iom malsimilajn kriteriojn.

Neniam eksmodaj estos kelkaj liaj detalaj priskriboj de homoj kaj psikologiaj situacioj. Jen, ekzemple, priskribo de viro, en unu paragrafo, ege konciza; sed kiom da viva bildigo kaj homa komprenemo aperas en tiu ĉi unu paragrafo!

„La afekta kutimo de maristoj, ŝajnigi sin neniam surprizebla per io ajn kion maro aŭ tero povas montri, iĝis por Peyrol dua naturo. Lerninte ek de la infanaj jaroj subpremi ĉiun mirosimptomon antaŭ ĉiuj eksterordinaraj vidoj kaj eventoj, ĉiuj strangaj homoj, ĉiuj strangaj moroj, kaj la plej timigaj fenomenoj de la naturo, kiel, ekzemple, la furiozo de vulkanoj aŭ de homoj, li vere iĝis indiferenta, aŭ eble nur tute senesprima. Li vidis tiel multajn bizarajn aŭ teruregajn aferojn, li aŭdis tiom da mirhistorioj, ke lia kutima mensa reago al nova sperto estis kutime formulita per la vortoj: „Mi vidis multajn aliajn.” La lasta okazo, kiam li sentis panikon antaŭ io preternatura, estis la morto, sub amaso da ĉifonaĵoj, de lia malgrasa, sovaĝa patrino; kaj la lasta afero, kiu preskaŭ senaplombigis lin, dekdujaran, per alispeca timego, estis la bruotumulto kaj la multeco de la homoj sur la kajoj en Marsejlo - io tute nekonceptebla, de kio li tuj rifuĝis malantaŭ amason da tritikosakoj, kiam oni forĉasis lin al la kajo el boato. Li restis tie, tremante, ĝis viro kun tripinta ĉapelo kaj portanta sabron ĉe la flanko (la knabo neniam antaŭe vidis tian sabron aŭ tian ĉapelon) kaptis lin per la brako, apud la akselo, kaj eltrenis lin; viro, kiu povus esti ogro (sed pri ogroj Peyrol neniam aŭdis), tamen kiu laŭ sia propra stilo estis timiga

kaj miriga preter io, kion li povus imagi, eĉ se lia imagopovo tiam estus evoluinta. Sendube ĉio ĉi estis sufiĉa, por mortigi lin per timo; sed tiu eblo ne eniris lian kapon. Ankaŭ, li ne frenezigis; sed, estante nur infano, li simple adaptis sin, per pasiva akceptado, al la novaj kaj nekларigeblaj vivsituacioj, post eble dudekkvar horoj. Post tia iniciĝo, la cetera ekzisto, ek de flugfiŝoj al balenoj kaj ĝis negroj kaj koralaj rifoj, ĝis ferdekoj sur kiu fluis multa sango, ĝis soifego en senŝirmaj boatoj - ŝajnis relative simpla vojaĝado. Kiam li aŭdis pri Revolucio en Francujo, kaj pri iaj Senmortaj Principoj, kiuj kaŭzis la morton de multaj, el la buŝoj de maristoj kaj vojaĝantoj kaj el jam jaraĝaj gazetoj el Eŭropo, li estis preta taksu la aktualaĵojn laŭ sia propra maniero. Ribelo sur ŝipo, ĵetado de oficiroj en la maron jes, li dufoje vidis tion, el du malsimilaj flankoj. Rilate al tiu ĉi perturbo, li ne partianiĝis. Ĝi estis tro malproksima, tro granda, nesufiĉe neta. Sed li sufiĉe rapide akiris la revolucionan ĵargonon, kaj kelkfoje uzis ĝin, kun sekreta malestimo. Ĉio, kion li travivis, ek de periodo de obseda amo al flavulino ĝis la sperto de perfido ĉe intima amiko kaj ŝipkamarado - kaj ambaŭ tiuj aferoj, Peyrol konfesis al si mem, estis preter lia komprenkapablo - kun ĉiuj gradetoj de varia spertado pri homoj kaj homaj pasioj, metis guton da universala malestimo, mirinda trankviligilo, en la strangan miksaĵon kiun oni povus nomi la animo de la reveninta Peyrol."

The Rover - La Marvaganto.

Kaj en la romano *Chance* („Hazardo”) relative simpla viro parolas pri la psikologio de juna virino, tre rafinita persono kiu plene havas la de *Conrad* admiratan „fidelecon”, sed kies patro estis malhonestulo, kaj kiu dum la vivo ricevis multajn nemeritajn riproĉojn:

„Si ne povis ne kredi tion, kion oni instruis al ŝi: ke ŝi estas, laŭ ia mistera maniero, malŝatinda kaj neaminda. Estis kruele vere - *por ŝi*. La orakolo post tiom da jaroj fine parolis. Sed aliaj homoj ne tuj komprenis ŝian malindecon Mi ne intencas diri, ke ŝi perfekte kredis tion. Tio estus apenaŭ ebla. Sed tamen, ĉu la plej flatitaj, la plej arogantaj inter ni, ne havas siajn momentojn de dubo? Ĉu ne? - Nu, mi ne scias. Eble ekzistas en la mondo feliĉuloj, kiuj ne kapablas pensi malbonon pri si mem. Mi mem povas diri al vi, ke iam - nun antaŭ multaj jaroj - mi sciigis, ke ulo, kun kiu mi rilatis en ia komerca aranĝo - manipululo, kiun mi fakte malestimis - rondiris kaj diradis al la homoj, ke mi estas perfekta hipokritulo. Li povis nenion scii pri tio. Nur plaĉis al lia humoro diri tion. Mi tute ne donis al li pretekston por tiu aparta kalumnio. Sed eĉ hodiaŭ estas momentoj, kiam ĝi venas al mia menso, kaj kontraŭvole mi demandas al mi mem: „Kaj kio, se tio estus vera?” Estas absurde, sed unu-du-foje ĝi preskaŭ modifis mian konduton. Kaj mi ne estis impresebla, senscia knabino. Mi perfekte mezuris antaŭe la plenan malin-

decon de tiu ulo. Li neniam estis por mi homo potenca kaj prestiĝa, kiel tiu abomeninda guvernistino de Flora de Barral. Vidu la potencon de sugestio! Ni vivas sub la minaco de malbonintenca vorto. Sono, nura perturbo en la aero, kelkfoje penetras en la animon mem."

F. R. Leavis, kiu estas inter la plej severaj kaj neromantikaj nuntempaj anglaj kritikistoj, inkluzivis *Conrad* en sia verko *La Granda Tradicio*, en kiu li priskribas siajn plej ŝatatajn romanistojn. Tiuj, kiuj iom konas la anglan literaturon, komprenos la signifon de la fakto, ke por *Leavis Conrad* rajtas havi lokon inter *George Eliot*, *Henry James*, kaj la plej al *Leavis* plaĉa verko de *Dickens*. Altega estas la reputacio de *Conrad* en Anglujo. Oni jam studas liajn librojn por ŝtataj ekzamenoj; oni studas lin kiel modelon de stilo; mi ofte trovis pecojn el libroj de *Conrad* preskribitajn kiel ekzercaĵojn pri stil-analizo. Verkistoj eminentaj povas konsili al junaj verkistoj anglaj, ke ili multe legu la verkojn de *Joseph Conrad*, por plibonigi sian anglan stilon! Sed preskaŭ nur la fakuloj scias, ke li estis - *Jozef Korzeniowski*, ke li iĝis vera majstro en lingvo, kiu, ĝis li estis plenkreska, estis al li preskaŭ nekonata. Antaŭ nelonge mi provis inter kelkaj mezkleraj, iom kulturitaj personoj; ĉiuj aŭdis pri *Conrad* kaj estimis lin, sed ili tute ne sciis, ke li ne estas laŭ deveno vera anglo. Multaj biografioj kaj studoj pri *Conrad* jam aperis; kaj, kvankam multaj literaturaj reputacioj tre fluktuas, mi neniam vidis provon malaltigi la reputacion de *Conrad*.

Tute eksterordinara estas la potenco kaj trafeco de lia stilo. Mi citos unu alian ekzemplon, el „*Lordo Joĉjo*”, en kiu *Conrad* skribas pri *Jim*, kiun oni ĵus arestis por konduki lin antaŭ duonsovaĝan reĝon. En tiu ĉi paragrafo ni trovos multan romantikon kaj lirikecon; sed tiu ironia rideto, per kiu ni eble eĉ tro facile reagis en la nuntempo al tiaj vortoj, estas tute malhelpita, per la esenca realismo de la priskribo, la malgrandaj detaloj, eĉ duonride diritaj, kiuj konvinkas nin pri la realeco de la stranga situacio:

(*Jim* estas en boato kun siaj kaptintoj.)

„Li sidis en ĝi, kiel mi diris al vi, sur sia lada kesto, kaj tenis la neŝargitan revolveron sur la sino. Li sidis tre zorgeme - kaj nenio pli lacigas - kaj tiel li eniris la landon, kiun, laŭdestine, li plenigos per la famo de siaj virtoj, ek de la enlandaj bluaj montoj ĝis la blanka saŭm-rubando sur la marbordo. Ĉe la unua serpentumaĵo li perdis la vidon de la maro, kun ĝiaj ŝvelantaj ondoj kiuj konstante leviĝis, malleviĝis, kaj malaperis por releviĝi - la veran simbolon pri la luktanta homaro - kaj li frontis al la senmovaj arbaroj, enradikitaj profunde en la teron, alsaltantaj al la sunlumo, ĉiamaj en la ombra potenco de sia tradicio, kiel la vivo mem. Kaj lia destino sidis ĉe la flanko, vualita kiel orienta novedzino, kiu atendas, ĝis la mano de la mastro malkovros ŝin. Ankaŭ li estis la heredanto de ombra kaj potenca tradicio! Li tamen diris al mi, ke neniam dum la tuta vivo li sentis sin tiel deprimita kaj

laca, kiel en tiu kanoto. La sola movo, kiun li kuraĝis fari, estis atingi, kvazaŭ kaŝe, la ŝelon de duonkokoso, kiu flosis inter liaj piedoj, kaj kun granda sinbrido forigi iom da akvo. Li eksciis, kiel malmola estas la kovrilo de lada kesto kiel sidloko. Li havis la sanon de heroo; sed plurfoje dum tiu vojaĝo li sentis vertiĝojn, kaj intertempe li meditis obtuze pri la probabla grandeco de la veziko, kiun la suno ŝveligis sur lia dorso. Por sin amuzi, li penis per antaŭrigardo decidi ĉiufoje ĉu la kotkovrita objekto kiun li vidis sur la bordo estas lignopeco aŭ aligatoro. Sed baldaŭ li rezignis pri tiu ludo. Ĝi ne estis amuza. Ĉiam aligatoro. Unu el ili plaŭde falis en la riveron kaj preskaŭ renversis la kanoton. Sed tiu ekscitiĝo estis tuj for. Poste, sur longa malplena riverparto, li sentis sin dankema al trupo da simioj kiuj venis al la bordo mem kaj faris insultan bruadegon dum li preterpasis. Laŭ tiu maniero li alproksimiĝis al grandeco, eble tiel aŭtentika, kiel la atingo de iu ajn. Ĉefe li sopiregis al la malleviĝo de la suno; kaj dume, la tri padelante preparis sian planon, fordoni lin al la rajao.

Jes, Conrad estis ja konscia artisto, vere dediĉita. En letero al Garnett en 1899, li diris: „Mi estas maljuna kaj malsana kaj ŝuldanta; sed mi antaŭ nelonge eksciis, ke mi ankoraŭ kapablas verki. Ĝi venas, ĝi venas, kaj mi estas juna kaj sana kaj riĉa.” En antaŭparolo al romano, li diris:

„La ŝanĝanta saĝeco de sinsekvaj generacioj demetas ideojn, dubas pri faktoj, detruas teoriojn:

Sed la artisto apelacias al tiu parto de nia esto, kiu ne dependas de saĝeco; al tiu en ni, kiu estas denaska, ne akirita, kaj, tial, pli daŭra. Li parolas al nia kapablo ĝoji kaj miri, al la sento de la mistero, kiu ĉirkaŭas niajn vivojn; al nia sento pri kompatato, kaj beleco, kaj doloro; al la latentata sento pri kamaradeco kun ĉio kreita - kaj al tiu delikata, sed nevenkebla konvinko pri solidareco, kiu kunligas la solecojn de nenombreblaj koroj, al la solidareco en revoj, en ĝojo, en sufero, en sopirado, en iluzioj, en espero, en timo, kiu kunligas ĉiujn homojn, la mortintajn al la vivantaj kaj la vivantaj al la ankoraŭ ne naskitaj.” Tia estis la alta celo de Joseph Conrad.

Specialan mesaĝon por ni esperantistoj havas tiu samlandano kaj samepokano de Zamenhof. Li absolute kaj por ĉiam pruvis, ke oni kapablas krei literaturon, en lingvo ne lia denaske. Dum Zamenhof kreis la unuajn verkojn en nova lingvo, Conrad kreis unikajn kaj belegajn verkojn en lingvo jam riĉe tradicia kaj vigle eksperimentkapabla. Du grandaj poloj vidis trans la limojn de sia hejma lando, kaj kreis ion, kion ili donacis al pli vasta mondo. Kaj por ĉiam nun, kiam iu nescianto diras: „Oni ne povas forigi la nacian lingvon por verki en alia”, ni havas ne nur verkistojn esperantajn por pruvi la eblon de esperanta literaturo; ni rajtas diri, uzante nomon konatan al la tuta literaturamanta mondo: „Ĉu vere? Kaj kio pri tiu Jozef Korzeniowski, kiu atingis mondfamon kiel la angla verkisto Joseph Conrad?”

ATAKOJ KONTRAŬ GARDENPLANTOJ de D-ro Paul NEERGAARD

licenciato de hortikulturo, magistro kaj doktoro de agronomio kaj sekciestro ĉe Ŝtata Plantpatologia Servo, Kopenhago, krome membro de la Akademio de Esperanto

La unua libro aperinta en Esperanto:

pri GARDENKULTURO, pri PLANTMALSANOJ,
pri INSEKTOJ, pri DAMAĜAJ FUNGOJ.

La libro enhavas 234 paĝojn artpaperajn, kiuj enhavas 75 tekstfigurojn. Krome, la libro enhavas 9 kolortabulojn, kiuj sume enhavas 85 figurojn, do la libro entute enhavas 160 bildojn!

Belege tuttote bindita, kun ora stampo kaj kolorpresita kovrilo, desegnitaj de la dana pentristo Mogens Zieler.

Prezo £ 1, aŭfranko 9p.

Eldonita de
THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD, ANGLUJO

Mendebila ĉe
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO,

Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando,
aŭ ĉe landaj kaj lokaj Libro-Servoj,

Profesoro ĉe la Agrikultura Kolegio de Okcident-Skotlando, D-ro HUGH NICOL, Ph.D., F.R.I.C., F.R.S.E., en *Esperanto*:

Mi ne konas libron verkitan anglalingve kiu valoras siaspece la duonon de “Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj” La libro estas perfekta kiel presajo, ĝia lingvo estas senerara. Guebla de ĉiu — fakisto aŭ ne.

Cefĝardenisto ĉe la Ŝtata Ĝardeneksperimentejo en Alnarp, Svedujo, S-ro CARL A. KLANG en *Svenska Esperanto-Tidningen*:

Tre malofte oni vidas tiel modernan, aktualan, belpresitan kaj seneraran faklibron Pri la enhavo mi konstatis, ke ĝi estas pli moderna kaj aktuala ol svedaj ĝardenlibroj, kiuj ĝis nun aperis.